Kongresa numero!

Aŭstria Esperantisto

1a jaro. No. 1 | Monata | Augusto 1924

Adreso de la redaktejo kaj administrejo: Korneuburg apud Wien, Hovengasse 12
La redaktejo ne povas resendi manuskriptojn. Lasta dato por ricevo: la 1a de ĉiu monato
Oni skribu tre legeble kaj konservu kopion

Jarabono:
Por Aŭstrianoj kaj Germanoj 20.000 aŭ. K, Eksterlandanoj 2.50 svis. fr.

Bonvenon en Wien!

Bonvenon koran, gefrataro kara,
Veninta tien ĉi pro la ĉeesto
Al nia granda, sankta manifesto
De l' jaro mil naŭcent kaj dudek-kvara!

Salutas vin la urbo populara
Kun gaja rid' kaj per afabla gesto,
Kun loĝantar', aminda la atesto,
Pri ĝia gastameco senkompara,

Ĝi vin salutas kun la kordeziro,
Ke, ĉu amuzo via ĉu laboro,
En ĝiaj muroj estu bonsukcesa;

Kaj por la tuta viv', post' hejmreiro,
Plej bela restu por vi la memoro
Al l' temp' en ĉarma Wien dum la XVIa.

Franz Zwach.

700.008-B.E.Sp
1924-26

KIEL WIEN ESTIĜIS URBEGO.

Vidante la domaregon kaj viglan frekventon en ĝi, la diversaspekton de la partoj, la amason da ričaĵoj pruvantaj altan kulturnivelon, ankaŭ tute fremda vizitanto sentas, ke historio multjarcenta devas esti teksinta tion, kion tie nuntempanoj povas admiri. Tian mozaikon dečifri kaj kompreneti la karakteron de la loĝantaro laŭ la eksteraj esprimformoj nur povas rigardanto, al kiu la historio flustras rimarkaron. — Tial tia estu notata.

El la pratempo nur elfositaj restoj konserviĝis ĝis niaj tagoj. La unuaj signoj de homa vivado sur tiu tero devenas el la ŝtonepoko de l' homa gento. Gentoj verŝajne finnaj vivis tie en domaĉoj konstruitaj pro minacantaj sovaĝbestoj sur palisoj en la marĉaro. En la bronzepoko ni renkontas la hindogermanan genton de l' Keltoj, enmigrintaj el Azio duonjarmilon antaŭ Kristo. Antikvaj moneroj pruvis, ke ili fondis en la Donaŭ-regiono vilaĝojn; ni scias plue, ke la Romanoj tie trovis la Keltojn, kiuj ĉe la Alprando elminis jam oron, feron, kupron kaj ĉefe salon.

Tiuj produktoj allogis la Romanojn, kiuj en 15—14 antaŭ Kristo sub Tiberius kaj Drusus pligrandigis sian regnon ĝis „Danubius flumen“ (rivero Donaŭ). De nordo samtempe venis la Germanoj. Sed la plej gravaj malamikoj de la Romanoj estis la Markomanoj kaj Quadoj loĝantaj tiam sub Marbod en Bohemio respektive Moravio. Post egaj bataloj 80 jaroj da paco. Sed jam estis rezultintaj du tortikigitaj lokoj en la regiono: Karnuntum kaj Vindobona; la lastenomita: kerno de la pliposta urbo Wien; ambaŭ konstruitaj je la loko de antaŭa kelta vilaĝo.[1]) Kiam Trajanus († 117) estis kreinta la unuan roman provincon norde de Donaŭ, lokiginta en Vindobonan la faman Caesar-an legionon „gemina“, post kiam Hadrianus (117—138) faris ĝin „municipium“ kaj multaj romaj komercistoj estis almigrintaj kaj Marcus Aurelius la 17. III. 180 estis mortinta tie, la loko ne plu perdis sian gravecon por la provinco Pannonia. Stratoj kaj pontoj estis konstruitaj, imperiestro Probus (276—82) enkondukis la vinberkulturon, la plej diversaj orientaj religioj estis importataj de la diversnacia sekvintaro de la Romanoj.

Pruvas la gravecon de ĝia situo kaj, ke la Romanoj plene ekkonis ĝin, la fakto, ke okaze la landdivido post la morto de Theodosius (395) Pannonia kun Vindobona estis aligata al la okcidenta parto de la regno, sed jam 427 per kontrakto al la orientromana regno: Ne mirinde, ĉar Wien ja tiam situis jam en la limregiono inter la orienta kaj okcidenta kulturrondoj de Eŭropo.

Tio dum la tuta tempo de la Granda Popolmigrado (IVa—VIIa jarcento) kaj poste pruviĝis ĝis al nia tempo: Hunoj, Avaroj, Madjaroj, Turkoj tramigris kontraŭflue laŭ la duavice plej granda rivero de Eŭropo la montarpordon inter Alpoj kaj Karpatoj okcidenten; en kontraŭa direkto tramarŝis aŭ rivere-traveturis ĝin la Nibelungoj, Alemanoj, krucmilitirantoj, germanaj koloniistoj. Ĉiuj relasante ian postsignon.

Kun tiu vojo orienton kun okcident' liganta kruciĝas en la region' de Wien nord-suda de la nordmarbordo trans Alpoj al Adriatika Maro: La antikva sukcenkomercista strato. Laŭ ĝi tramigris al Italujo la Langobardoj, posedintaj la landon laŭfakte, kvankam ĝi teorie estis Byzanz-ana post la disfalo de la orientgota regno (555).

Sekvante la Avarojn, kiuj 200 jarojn posedis nian urbon, estis ankaŭ envenintaj en la VIa jarcento la Slavoj: La Slovenoj ekloĝis ĉe Donaŭ, Save kaj Draŭ, la Serboj kaj Hrovatoj pli poste en Dalmatio, Serbujo kaj Kroatujo, la Ĉeĥoj ĉe la mezo de Elbe-rivero;

[1]) La nomo Wien do estas keltodevena: „vindo“ en prakelta lingvo signifas „blanka“ (irlingve „find“); „bonu“ signifas tion, „kio estas malsupre, tero, fundo“ (irlingve „bun, bona“ [genitivo]); do: „tero de la blank(haŭt)-uloj“.

fine la Bulgaroj, kiuj en 687 fondis propran regnon jam.

Tiu granda šanĝoplena epoko finiĝis en la jaroj 791—97 per sukcesantaj militiroj de Karl „la Granda“ (768 ĝis 814) kontraŭ la Avaroj, kiuj endanĝerigis lian germanan regnon. Jam en 791 li penetris ĝis Raab-rivero. La akiritan teritorion li partigis (803): La nordokcidenta parto estis nomata „Markgrafschaft im Ostlande“, tio estas „Limgrafsidejo en la orienta lando“. Al tiu apartenis Pannonia kaj Ostmark (Orienta limlando), do ankaŭ Wien. Karl semis tie ĉi la germanan kulturon. Li katolikigis la loĝantaron kaj ordonis, ke la predikoj estu parolataj ne en latina — tiam la lingvo de la kleruloj en Germanlando — sed „in diutisca lingna“, t. e. en popola lingvo.[2]) Li envenigis germanajn monanojn kaj al tiuj kleruloj (tiam preskaŭ la solaj en la popolo) kaj al la monaneĵlernejoj fonditaj de ili nia popolo dankas la unuan instruon kaj la frankajn radikojn de sia kulturo.

Komence de la IXa jarcento Altai-a gento loĝinta ĝis tiam ĉe la riveroj Dnjestr kaj Dnjepr venis sub sia duko Arpad serĉante paŝtejojn al malsupra Donaŭ: La Madjaroj. Forpremataj de la Peĉenegoj ili penetris okcidenten laŭ la riverego kaj premdividis norden kaj suden la pacemajn Slavojn.[3])

Kiam Luitpold von Bayern estis venkita de ili, Ostmark malaperis.

Ne mirinde do, ke la germanaj regantoj konsideris la Madjarojn danĝeraj por sia regno kaj kontraŭbatalis ilin dum multaj jaroj. Fine imperiestro Otto I. venkis ilin en 955 kaj renovigis la provincon Ostmark. Otto II. en 976 donis la landon al franka grafo Leopold, kiu devendiris sian familion de la tiam fama germana heroo Adalbert von Bamberg. Pro tio la sekvinta dinastio sin nomis Babenberger, t. e. Babenberg-anoj. Ili regis la landon de 976—1246.

Malrapide sed konstante reekfloris germana kulturo tie kaj la dinastia posedajo estis pligrandigata, kompreneble komence per militado. Sub Ernst „la Kuraĝa“ (1055—1075) ĝi etendiĝis jam ĝis la riveroj Leitha, March kaj Thaya, ampleksante 20.240 kvadr. kilometrojn. Leopold III. „la Sankta“ (1096—1136) translokigis sian registsidejon de Melk[4]) sur la monton Kahlenberg ĉe Wien, do okcidenten. Tio pruvas, ke la regiono jam ree estis ekster danĝero. Li fondis kelkajn monaĥejojn akcelante tiel la popolklerigon sur eklezia fundamento.

El la tempo de Heinrich II. „Jasomirgott“[5]) (1141—1177) konserviĝis en Wien la plej malnovaj konstrurestajoj[6]) super la tero.

Heinrich II. ricevis por sia lando de imperiestro Friedrich Barbarossa (= la Ruĝbarbulo) la Malgrandan Privilegion (1156), per kiu ĝi estis deklarata duklando. Krome tiu dokumento preparis jam ĝerme la memstarecon de Aŭstrio per la deklaroj, ke la duko havas la solan juĝrajton, devas disponigi armeon nur okaze de militoj ĉe siaj landlimoj kaj la disponrajton pri la lando havas li kaj lia edzino. Heinrich loĝigis sin en Wien, en kastelo „Am Hof“, alvokis la Skotajn monanojn kaj konstruis je la loko de tiam longe jam ekzistinta kapelo preĝejon, de kiu partoj ankoraŭ estas videblaj en la nuntempa katedralo de S. Stefano.

Ĉiuj tiamaj regantoj de Aŭstrio parto-

---

[2]) „Diutisc“ estas adjektivo al la substantivo „theoda“ = „popolo“. Komparu la nomon Theodorich (-rich = riĉa; do = „La popolriĉa“).

[3]) De tiam ekzistas nord- kaj sudslavoj.

[4]) Ĉe Donaŭ, 90 km kontraŭflue de Wien.

[5]) T. s. „Jes, se al mi Dio“ (kompletigota = „helpos“) laŭ lia kutima respondo, kiam li estis petata.

[6]) Proksimume je la jaro 1000 komencas en Aŭstrio la „romana“ (ne roma!) artstilo, germana spiritprodukto evoluiĝinta laŭ romaj modeloj envenigitaj kun roma kulturo per romaj ekleziuloj, la tiamaj kulturpioniroj en Germanlando. Tiu stilo transformiĝis pli kaj pli germaniĝante de 1100 ĝis proks. 1250 en la gotikan.

prenis krucmilitirojn, per kio nia kulturo denove tuŝiĝis kun la oriento.

Leopold VI. „la Glororiĉa“ (1198—1230) tre subtenis la komercistojn, pruntis monon al la burĝaro de Wien helpante tiel pligrandigi ĝin kaj deklaris ĝin „urbo“ (1221). Je lia kortego — li konstruigis la unuan kastelon sura la loko de la ankoraŭ ekzistanta — vivis artistoj ĉiuspecaj, precipe poetoj; inter ili la eminenta lirikisto Walther von der Vogelweide.

Kun Friedrich II. „la Batalema“ (1230—46), kiu luktis kun Hungaroj, Bohemoj, kun sia nobelaro, kun la imperiestro, kun la burĝoj de siaj urboj kaj fine batalmortis ĉe la rivero Leitha (1246), kun li finas la Babenbergana epoko.

La „interregna“ [7]) tempo daŭras en Aŭstrio de 1246 ĝis 1282. Ĝi estas la tempo, kiun Schiller nomis en poemo „la senregnestra, terura temp'“, pro tio, ĉar diversaj „nobeloj“ uzis la okazon, ke ne ekzistis rekonita plejpotenculo inter ili, por direkti siajn armilojn kontraŭ senŝirmaj kamparanoj kaj precipe kontraŭ komercistaj karavanoj riĉaj, kiuj pretervojaĝis, elembuske atakante ilin, ĉar „rajton“ havis nur la pli forta, oni nomas tian staton tiun de le „pugnorajto“.

Sed por Wien Přemisl Ottokar II., enveninta el Bohemio, komencigis novan brilepokon. Li edzigis sin al Margarete, fratino de la lasta Babenbergano, por havi „juran rajton“ je la lando. Li akcelis la terkulturon, la financojn, arton kaj sciencon kaj, kiam granda brulo en 1276 detruis du trionojn da la urbo, li rekonstruigis ĝin je siaj kostoj. Ĉiel klopodis li akiri la simpation de la loĝantaro, precipe per pligrandigo de S. Ŝtefanpreĝejo laŭ la tiam moderniginta stilo gotika.

Sed en 1276 li devis sin submeti al Rudolf von Habsburg [8]) (1276 ĝis 1282) elektita germana imperiestro depost 1273.

Jam sub lia filo Albrecht I. (1282 ĝis 1308) komencis la aspiroj je pligrandigo de la dinastia potenco. La „Dinastiregularo“ (1535) de la tre pacema Albrecht II. (1330—58) dekretis la nedivideblon de la Habsburganaj landoj.

Lia filo Rudolf IV. „la Fondinto“ (1358—65) konfirmis ĝin kaj dekretis, ke ĉiam la plej aĝa filo sekvu en la regado. Rimarkindaj estas liaj reformoj de la mon- kaj impostaferoj, subtenado de komerco kaj metiaro, interesoj por scienco kaj arto: Li fondis en 1365 la universitaton en Wien kaj konstruigis la simbolon de l' urbo, la turegon de la katedralo (1365—1433).

Maximilian I. (1493—1519) faris la Habsburgan dinastion „grandpotenco“ de Eŭropo, precipe per aligo de Burgund. Lia regno ampleksis 105.050 kv. km. Per saĝa edzigo de siaj genepoj Ferdinand kaj Maria, la renovigo de heredkontraktoj pri Aŭstrio, Hungario kaj Bohemio (1515) li certigis ĝian estonton. Aŭstrio dankas al tiu klera homo la unuan poŝtinterligon (al Nederlando), ekfloron de siaj ekonomia vivo kaj kulturo. Konata ja estas lia amikeco kun Albrecht Dürer, kiu ilustris liajn poemajn verkojn. La universitato iĝis bastiono de l' humanismo. Tiuj humanismaj tendencoj komprenigas la aperon de italaj kaj germanaj renesancinfluoj en Aŭstrio.

Lia nepo Ferdinand I. (1522 ĝis 1564) jam unu jaron post sia edziĝo povis kunigi sub sia mano la plej grandan iam atingitan aŭstrian regnon (445 000 km²). Bedaŭre li ne sukcesis diplomatie solvi la tiam ekestintan konfesian problemon. Li malpermesis en 1522 la skribaĵojn de Martin Luther [9]) en siaj landoj; sekvo: ribeloj; konsekvenco: perfortigo de la protestantoj, enlandaj militoj. En 1547 venkinte ĉe Mühlberg li komencis rekatolikigon. Intertempe partio en Hungario,

[7]) Pli precize: „interdinastia“.

[8]) Ties dinastio, la Habsburganoj, regis en Aŭstrio ĝis 1740; aŭ, se oni alnombras ankaŭ la Habsburg-Lothringanojn, ĝis 1918.

[9]) La kreinto de l' protestantismo, kiu fiksis siajn reformtezojn je la preĝejpordo en Wittenberg (1. IX. 1517).

kiu ne volis rekoni lin hungara reĝo, sub Johann Zapolya ekribelis. Ĉe Mohacs (1526) venkita tiu devis forkuri, trovis helpon ĉe la Turkoj kaj tiuj marŝis sub sultano Soliman kontraŭ Wien. Tiu Unua Turksiego (1529), dum kiu grafo Niklas Salm komandis la urbon, ne sukcesis tute. Tamen Hungario estis tripartigata, por Ferdinand restis nur 165.000 km² (de 329.800).

Lia filo Maximilian II. (1564—76) favoris la protestantojn kaj cedis al ĉiuj liberan religipraktikadon.

Tamen je la fino de lia regado preskaŭ ĉesas la kultura vivo en Wien, ĉar lia sekvanto Rudolf II., kiu estis pli scienculo kaj artamanto ol registo, sin loĝigis en Praha.

Matthias (1612—19) forlasis la protestanteman regmanieron influata de kardinalo Khlesl, kio kaŭzis nekontentecon en Hungario (Bethlen Gabor) kaj Bohemio, kie fine la imperiestraj funkciuloj Martinitz, Slavata kaj Fabricius estis jetataj el fenestro de la kastelo en Praha (23. V. 1618). Kelkajn monatojn poste mortis Matthias kaj lia energia filo Ferdinand II. (1619—37) celis perforte subpremi tian ribeladon: La 30jara milito (1618—48) estis komencita. Sed ĝi ne tuŝis senpere la urbon Wien. Post mallonga stilkripliĝa tempo (1600—20) komencas la Jesuanaj monaĥoj tie sian verkon. Ili uzis la pompan barokstilon (kvazaŭ plejfortigita renesanco) por imponi al la popolo kaj tiel venkigi la katolikismon. Tio efektive sukcesis ĉe nia sentema popolo kaj ankoraŭ estas videblaj kelkaj preĝejoj en Wien montrantaj la iom sekan, seriozan, kvazaŭ pentpredikantan barokstilon el ties unua aŭstria fazo.

Sed la militado ne finis en 1648 por Aŭstrio. Malsukcesis la diplomatio de Leopold I. (1657—1705) en Hungario (Rakoczy), en Francujo (Louis XIV.). Fine la malkontentaj Hungaroj sin kunigis kun Turkoj kaj protestantoj rifuĝintaj Turkujon kaj al Siebenbürgen kaj kune sub la nomo Kurucoj komencis neregulan militon subtenitaj de Francujo. Helpe venis la turka ĉefveziro Kara Mustafa kun 250.000 Turkoj kaj sieĝis la 16. VII. 1683 la urbon Wien. Leopold, surprizita, povis kolekti nur 35.000 virojn, rifuĝis al Linz (ĉe Donaŭ) kaj alvokis de tie helpon: Johann III. Sobieski el Polujo, la princojn de Sachsen, Bayern kaj Brandenburg. Ili liberigis la urbon (12. IX.). Tiu Dua Turksiego en 1683 estas markŝtono en la historio de Wien. Ĝi komprenigas, ke oni dokumentojn el antaŭa tempo preskaŭ ne trovas ekster la unua urbdistrikto, la tiama fortikigita urbo.

Sed ne jam trankvilo! En 1704 Eugen de Savoyen devis ĉirkaŭi la urbon kaj la rekonstruitajn autaŭurbojn pro la Kurucoj per nova fortikajo, kies lokon ankoraŭ nun montras klare Gürtelstrasse, t. s. zonstrato. El la paca agado de Leopold I. ni nur notu, ke li ŝirmdoganumis silkon kaj drapon, monopoligis la tabakon kaj fondis en 1705 la poste tre gravan akademion por belartoj (pliampleksigita 1726).

Sub Karl VI. (1711—40) kulminacia fazo de la kortega vivo. La baroka stilo pliintimiĝas al rokokoarto. Fischer von Erlach kaj Lukas von Hildebrand k. m. a. konstruas la kulisojn por pompaj festoj: kastelojn, palacojn. Favoraj komerckontraktoj kun Turkujo, fondo de la liberhavenoj en Trieste kaj Fiume akcelas komercon kaj industrion. Spegul-, katun-, porcelanfabrikoj ekestas; sciencoj floras, la filozofo Leibniz estas en Wien. Tamen ni ne forgesu, ke depost Ferdinand II. la regsistemo estis absoluta; la „Krono“ havis la rajton de leĝdonado. La nomo Oesterreich (Aŭstrio) jam signifis ĉiujn kronlandojn kune, ili estis komune administrataj, kio naskis la „oficistŝtaton Aŭstrio“. La urboj estis parte sendependaj, parte subigitaj al personoj aŭ korporacioj; la kamparanaro nelibera kaj labordeva (per manoj aŭ per jungĉevaloj) por siaj superuloj, la terposedantaj nobeloj.

Karlon la VIan sekvis lia filino Maria Theresia (1740—80), ege bonkora, prudenta kaj virenergia virino. Ŝi ĉirkaŭis sin per bonegaj konsilantoj

kaj reorganizis alcentrigante la administradon de sia regno: Ministrejo por internaj aferoj, justecministrejo disigita de l' administraj aferoj, forigo de la torturesploro (1776), registrigo de ĉiuj terpeclimoj (1748), impostreformoj. Mem tre pia ŝi tamen pro sia justemo tuŝis senteble ankaŭ la ekleziularon: ĉesigis ilian impostliberecon, malplinombrigis la monaĥejojn, forigis la hontigan publikan pekpentadon k. s. a. En ekonomia kampo ŝi protektis la enlandan industrion per altaj limdepagoj importaj kaj celis grandan eksporton. Fero-, koton-, silko- kaj ledindustrioj kaj pro ili la komerco prosperis: Ŝipveturado sur Donaŭ pliiĝis, komercakademio estis fondata, la unua papermono eldonata de la urba banko en Wien. Koloniistojn ŝi sendis Hungarion por fruktigi la teron. Pro ĉio ĉi la monumento impona antaŭ la kastelo, kiu montras la imperiestrinon ĉirkaŭita de siaj helpintoj, ne trograndige esprimas ŝian gloron, mencias ŝian meriton je la lando.

Kia patrino, tia filo. Josef II. jam regis kun sia patrino depost la morto de sia patro Franz von Lothringen en 1765, sola de 1780—1790. Li daŭrigis la laboron de sia patrino. De ŝi li heredis la bonfartigeman koron por la popolo; ankoraŭ nun li estas memorata kun ĉiuflanka estimo de la buŝa tradicio, la „popolimperiestro". Bedaŭre multaj el liaj reformoj (egala impostumo de la torpesedaĵo), kiuj tuj estis vekintaj malkontenton, poste devis esti renuligataj. Tamen multaj restis je la ben' de l' popolo: „Universala Jugejordo" (1781), elservutigo de la kamparanaro, justecflegado per science preparitaj juĝistoj, nova punleĝaro (1787); egalrajtigo de la protestantoj kaj neunuigitaj grekekleziauoj kun la katolikoj (1781), forigo de ĉiuj monaĥejoj, kies loĝantoj ne sin dediĉis al instruado, malsanulflegado aŭ animzorgado (1782), ŝtate kontrolataj seminarioj; deklaro, ke la edzeco estas intercivitana kontrakto (1783); malpermeso de importo je kelkaj produktoj, sed protekto de ties enlanda produktado; komerckontraktoj, konsulejplinombrigo, stratkonstruo; koloniigo ne nur en Hungario, sed ankaŭ en Galicio kaj Bukowino. La universitatoj estis ĉefe reorganizataj konsiderante ilian praktikan valoron. La „Kortegan kaj Nacian Teatron" (fonditan 1776) li malfermis al la germana dramo. Rigardante la multajn publikajn konstruaĵojn el lia tempo, oficejdomojn, hospitalojn, kazernojn, oni je la sobraj linioj, ilia sola ornamo, tuj vidas, ke la celo ne beleco estis la ĉefaĵo: Interniĝinta serioze-pensema kulturo.[10])

Sekvas netrankvila epoko nun, ankaŭ por Wien. Sub Leopold II., frato de Josef (1790—92), ekestis en Francujo la revolucio, kies ondoj etendiĝis ĝis trans Aŭstrio.

La epokon de Franz II. (1792 ĝis 1835) karakterizas la defendo kontraŭ Napoleon Bonaparte. Kiam tiu deklaris sin imperiestro de la Francoj, Franz nomis sin „heredimperiestro de Aŭstrio" (1804). La fondiĝo de Rheinligo sub la protekto de Napoleon kaŭzis, ke li (6. VIII. 1806) rezignis je la indo, esti germana imperiestro: Aŭstrio ankaŭ titole estis sendependa de Germanlando. En la somerkastelo Schönbrunn, kie Napoleon havis sian ĉefstabejon (12.—27. XII. 1805), 4 jarojn poste estis farata la packontrakto (X. 1809) neoportuna por Aŭstrio. Premita stato kvarjara. Sed ree la urbo ekbrilis en la tagoj de la „Kongreso en Wien", en vintro 1814—15, kie oni post la batalo ĉe Leipzig (16.—19. X. 1813) reordigis la ŝtataferojn de Eŭropo. Kompreneble la militado konsumis multegon da mono. Ĉar en 1811 la papermono jam sumis 1060 milionojn da guldenoj, oni reduktis la valoron de la bank-

[10]) Ĉar oni reekkaptis en tiu rektlinia konstrustilo klasikajn elementojn, ĝi estas nomata „Josefa klasikismo". La barokstilo en la tempo 1775—1800 monstriĝis en siaj formelementoj kiel la modo tiama entute kaj estas iom sarkasme nomata Zopf(harplektaĵa)stilo laŭ la perukmodo de tiu tempo.

biletoj al 1/5 de ilia antaŭa valoro! — Sed ankoraŭ sub Franz resaniĝis la laborema popolo. Kanaloj estis konstruataj kaj fervojoj,[11]) sur Donaŭ komencis vaporŝipveturado inter Wien kaj Pest (1831), teknikaj altlernejoj estis fondataj (Wien 1815). Kiam la konstruarto reekfloris, oni kun modestaj rimedoj aplikis la tiam nove ekkonitajn formojn[12]) el Pompeï, Stabiä kaj Herkulaneum. Tiuj formoj, tiam modernaj, estis diskonigataj per la Napoleonaj militoj preskaŭ ĉiuloke en Mezeŭropo. En la germanaj landoj oni elektis precipe la simbolojn esprimantajn funebron kaj mondodoloron (cindrovazojn, torĉojn, epitafsimilajn portretmedaliojn, florkronojn k. s.) ornamante per ili la rigide graciajn Empire-konstruajojn, -meblojn, -tapetojn k.t.p. (proks. 1800—1820).

Kiam pli vastaj grupoj en la popolo ekuzis tiun esprimformon, ĝi pli kaj pli perdis la fremdan karakteron, akomodiĝis al la sudgermana popolkaraktero, plisimpliĝis kaj largiĝante, komfortiĝante transiĝis en la Biedermeier-[13]) stilon. „Biedermeier"-tempo estas nomata la epoko 1820—40, unu inter la plej karakterizaj por la popolo de Wien. Simpleco la stampo: Preskaŭ ĉio estas kvadrata kaj cilindra.[14]) Same senpompaj la kostumoj: Pureco kaj ordemo estas pli ŝatataj ol luksaj ornamaĵoj. — En tiu tempo la animvivo pli valoris ol ekstera brilo: La epoko de Grillparzer, la Wien-a drampoeto, de Schubert, kiu per intimaj rimedoj[15]) esprimis muzike siajn sentojn, tiu epoko ne postlasis monumentajn konstruaĵojn; modestaj dometoj hejmecon spirantaj memorigas ĝin en la antaŭurbetoj.

Ferdinand I. (1835—48), bonkorega, sed malforta registo, estis tipa Aŭstriano. Karakterizas lin la emo al teknologio kaj agrikulturo. La honordonacojn ricevitajn ĉe sia kronumo de la Hungaroj kaj Bohemoj (po 50.000 dukatojn) li dediĉis al malriĉiĝintaj komunumoj, por fondo de akademio en Pest kaj aliaj publikaj celoj. En 1848, post la revoluciaj oktobrotagoj, li rezignis je la trono cedante ĝin al

Franz Josef I. (1848—1917). En 1848 en Wien estis okazinta akra batalado por la libereco de la popolo. Malgraŭ kelkaj akiraĵoj la reakcio venkis, kaŭzante kaj simbolante la sorton de la liberecideo en Eŭropo. Per „Concordat" (1855) la potenco de l' episkopoj ree estis pligrandigata.[16]) Sed la „spirito de la temp'" ne lasis sin subpremi. La loĝantarnombro estis tre kreskinta, la unua ringo da antaŭurboj inter la du fortikajoj perdinta sian kamparan aspekton: densa multetaĝa domaro estiĝinta, la laŭkamparaj domoj anstataŭitaj per laborejoj, domegoj kun lueblaj loĝejoj, fabrikoj. La ĝarden- kaj vinberkulturo, la vilaoj rifuĝis en duan antaŭurbaron okcidenten ĝis suden ekster la linifortikajon. Laŭ tio la internaj antaŭurbetoj estis aligitaj al Wien (1857), la interna fortikajo forigata kaj je ties loko komencata en 1863 la konstruado de la plej bela strato de l' tero, la Ringstrato. La interna evoluiĝo estis ege subtenata per la reorganizo de la lernejoj, precipe gimnazioj kaj universitato (1849—50); la novefondo de reallernejoj, teknikaj faklernejoj kaj akademioj montras jam klare la venkon de la teknika epoko: Wien ekestas la kleriga centro de la lando. El ĉiuj partoj altorentas metiistoj, studantoj, reportante hejmen la tie akiritan klerecon. Wien, kiu en la Biedermeiertempo famkonatiĝis pro sia industrio (precipe mebloj, kostumoj, ledaĵoj, ornamaĵoj), estiĝas la unua ranga fabrikurbo

---

[11]) La unua inter Linz kaj Budweis 1825/27.

[12]) La konataj tri romanaj urboj, cindrokovritaj ĉe la Vesuv-eksplodo 24.VIII.79 p.Kr., estis 1808—15 sub Murat laŭsisteme elfosataj.

[13]) La esprimo „bieder" signifas „lojala, honesta, simpla, modesta"; „Meier" = tre ofta germana familia nomo, tial uzata ankaŭ por signi mezmezurecon.

[14]) Egiptaj kaj asiraj influoj transplantitaj per la Napoleonaj militiroj tien.

[15]) Kvartetoj por kordinstrumentoj, muzikaĵoj por fortepiano, kortuŝantaj kantoj.

[16]) Tamen restis depost Josef II. netuŝata la supereco de la ŝtato je la eklezio.

en la regno, interligpunkto de la fervojoj. Donaŭ devis esti reguligata en la jaro 1868.

Ankaŭ la internaj interkomunikiĝebloj devis šanĝiĝi. Antaŭ la XVIIIa jarcento tiu problemo preskaŭ ne ekzistis: La urbo estis malgranda, la distancoj mallongaj, la homoj „havis tempon"; por eliri el la remparoj ne estis multaj kaŭzoj, ĉar la antaŭvilaĝoj estis maldense loĝataj. En 1703 oni aranĝis seĝportadon per numeritaj portistoj, depost 1750 estis uzataj fiakroj kaj poste diversaj aliaj lueblaj veturiloj ĉevaljungitaj. 1825 ekveturis omnibusoj. En oktobro 1865 estis funkciigata la Unua Wien-a Ĉevaltramvojo, poste elektrigita,[17]) en majo 1898 la Urbfervojo (nun elektrigata).

Intertempe ĉiam estis kreskinta la industrio, la kerno de la urbo iĝis oficeja kaj negoca centro kaj ankaŭ la ekstera domarzono ekestis fabrika kaj laborista kvartalo. Tial tiu regiono en 1890 ankaŭ estis unuigata kun la antaŭaj dek distriktoj de la urbo: Wien estis urbego. En 1910 alvenis la lasta parto: la 21a urbdistrikto norde de Donaŭ, industri- kaj agrikulturdistrikto.

Depost la dua triono de l' pasinta jarcento la amasego da domoj kaj homoj estis por tiuj ĉi jam sanecproblemo. Tial sub la urbestro d-ro Karl Lueger komencis laŭsistema aerprovizumo de la urbego per tio, ke en larĝa zono ĉirkaŭ ĝi estis malpermesata la domkonstruado, sed zorge flegataj klorofilkreskaĵoj. Tiu regiono estas nomata arbar- kaj herbejzono. Krome sur la plej malgrandaj se oportunaj loketoj en tuta la urbo estis plantitaj arboj aŭ almenaŭ herbo kun kelkaj floroj. Samtempe kun tiu solvo de la higiena problemo tiel ankaŭ plibeliĝis Wien.[18])

Dua grava problemo estis la akvoprovizumo. Ĝi okazas nun per du akvokondukilaranĝoj, kiuj el la altmontaro transportas ĉiujare unu miliardon da hektolitroj de plej bona Alpfonta akvo al Wien.[19])

Tria problemo: La entombigo.[20]) En Wien mortas ĉiujare pli ol 30.000 homoj. La enurbajn tombejojn oni plejparte jam eksigis aranĝinte oriente antaŭ la urbo grandiozan Centrotombejon, kie en lasta tempo estis konstruata kremaciejo.

Alia sanecproblemo: La banado. Ekzistas nun en Wien 45 bandomoj (inter ili 22 komunumaj), krome 13 komunumaj somerbanejoj kaj 6 nur por infanoj krome.

Por lumigado servas gaso kaj elektro. La gasfabrikoj produktas el kvar milionoj kilogram-centoj karbo en unu jaro 180,000.000 kub. m. da gaso, kiu per 1600 km longa tubaro estas kondukata al 285 000 abonintoj kaj krome provizas 24.000 stratlampojn. La elektrofarejo liveras 300 milionojn da kilowatt-horoj por 3 milionoj da ardlampoj kaj 18.000 arklampoj.[21])

Tiun bildon ankoraŭ kompletigu jena resumo:

Wien estas la elirpunkto de 7 fervojoj; 5 grandaj pontoj kondukas trans la riveregon (krome ekzistas en la urbo 78). La eksterlando estas reprezentata per 30 ambasadorejoj, 29 konsulejoj; krome 5 pasportejoj. Ĝi enhavas 13 ministrejojn; 155 poŝtejojn; 38 grandajn moninstitutojn; 55 hospitalojn, 10 blindulejojn, 8 orfejojn, kompreneble savsocieton.[22]) Troviĝas tie 122 preĝejoj katolikaj, 52 sinagogoj kaj hebreaj preĝejoj, 9 protestantaj kaj 7 por alikonfesianoj. La arturbon karakterizas 17 teatroj, 5 grandaj koncertejoj; krom 17 rimarkindaj amuzigejoj ekzistas multaj malpligrandaj.

---

[17]) Nuna tramvojo: Sur 287 km longa tramaro 1480 motorvagonoj, 1832 alpendvagonoj; 79 linioj.

[18]) Ĝiaj nunaj publikaj ĝardenoj ampleksas 2 milionojn da kv. metroj.

[19]) Enurba tubaro 1400 km. Kanaloj forfluigaj 1000 km.

[20]) La nuntempe ekzistantaj 32 tombejoj ampleksas 3·5 milionojn da kv. metroj.

[21]) Krome por 47.000 motoroj.

[22]) Ankaŭ unu por bestoj.

La komunumo estas administrata de urbestro,[23]) naŭmembra Urbsenato kaj centdudekmembra Komunuma Konsilantaro helpe de Magistrato (profesiaj oficistoj) organizita en 56 departementoj. La buĝeto por 1924 la komunumo elspezas pojare 3 bilionojn da kronoj; de tio 1 bilionon por la 50 000 postenhavantoj (inkluzive geinstruistoj), 550 miliardojn por konservado de konstruajoj, stratoj, ĝardenoj, akvokondukiloj, kanaloj, banejoj kaj por lumigado, 400 miliardojn por la 605 popol- kaj burĝlernejoj,[24]) 50 miliardojn por foiroj (pli ol 50) kaj buĉejoj (6), 30 miliardojn por la fajrobrigado.

Tio estas la nuna stato.[25]) Se ankaŭ Wien multon perdis en la jaroj de la mondmilito, per kiu granda parto de la loĝantaro mizeriĝis, ĝi ne povis perdi sian gravan geografan situon kaj sian multjarcentan historian tradicion, la du fundamentŝtonojn de ĝia aparta evoluiĝo.

Wien restis post la revoluciaj tagoj en 1918, post la rifuĝo de la lasta imperiestro Karl, kiu estis reginta nur kelkajn monatojn, ĉefurbo de la nova Liglanda Respubliko Aŭstrio,[26]) ĝia administra, ekonomia kaj spirita centro, volonte vizitata de fremduloj pro siaj agrablaĵoj, vidindaĵoj kaj beleco kaj pro la gastigemo de sia loĝantaro.

* * *

Meteorologiaj cirkonstancoj en Wien.

Aerpremo (50jara meznombro): 743·93 mm. Maksimumo 760, minimumo 720 mm.

Temperaturo (125jara meznombro): 9·1° C. Maksimumo 30, minimumo — 15° C.

Vaporpremo (30jara meznombro): 7·1 mm. Maksimumo 16, minimumo 1·5 mm.

Malsekeco (30jara meznombro): 75%. Minimumo 25%.

Deĉielajoj (60jara meznombro): 627 mm. Maksimumo en 24 horoj 53 mm. 152 tagoj (50jara meznombro). Fulmotondroj: 35 tagoj.

Nubumo (50jara meznombro): 5·8.

Ozono (mezmezure): 6.

Sunlumo (20jara meznombro): 1842 horoj.

Ventoj, precipe okcidentaj (varmetaj, malseketaj): Maksimumoj en julio 510 (9200 km) kaj decembro 550 horoj (12.300 km); sud-orientaj (malvarmetaj, sekaj): Maksimumoj en januaro 280 (4400 km) kaj oktobro 250 horoj (2600 km). Senventeco: 8760 horoj pojare.

(Laŭ oficialaj kaj aliaj fidindaj fontoj.)

Walter Smital, Wien.

---

[23]) Nun s-ro Karl Seitz.

[24]) 4956 klasoj, 150.000 infanoj, 7000 geinstruistoj.

[25]) Teritorio: 278 km², konturlinio: 100 km. Loĝantaro: 1,865.110 en 45.000 domoj, en kiuj troviĝas 600.000 loĝejoj kaj vendejoj.

[26]) Loĝantaro: 6,526.661 (Popolnombrado de l' 7. III. 1923).

Ĉu vi forgesis?

U.E.A. *bezonas abonantojn!*

RADIOKONSOLO.

Radiokoncertoj de „Radiowelt" (Radiomondo) por blinduloj kaj malsanuloj.

Radio, la plej esperiga teknika eltrovaĵo, estas ankaŭ unu el la plej utilaj kulturiloj, kies uzeblecon oni nun volas servigi al la humaneco. „Radiowelt", Wien-a radiojurnalo, intencas nun en konsento kun la direkcio de la sendstacio Radio-Hekafon (Czeija, Nissl & Co) kaj direkcioj de blindulinstitutoj aranĝi koncertojn por blinduloj. Aliaj koncertoj en malsanulejoj, prizorgejoj por infanoj kaj maljunuloj sekvos. Ĉu ne infanoj, malsanuloj kaj maljunuloj havas la unuan rajton je konsolo kaj distraĵo, kiujn povas al ili prezenti la senfadena telefonio? Tio

estas la pli profunda senco de la radiokonsolo kaj ĝia interna tasko. Temas pri tio, havigi al senĝojuloj ĝojon, al soluloj distraĵon, al malgajuloj gajecon. La plej nobla konsolo por blinduloj estas la muziko. Sed koncertoj estas maloftaj, gramofono baldaŭ eluzita kaj la memmuzikado estas limigita al nur malgranda parto da ili. Sed radioaparato alportas de malproksime belecon, gajecon, scion kaj sensaciojn plej diversajn. Kiu pro malriĉeco kaj malsaneco estas katenita al malvastaĵo, al tiu ĝi alportas la malproksimon; kaj la sento pri malproksimeco mem ja estas riĉeco. Radiotelefonio la tutan mondon pli malgrandigis, sed al la unuopulo ĝi pligrandigas ĝin. La senfadena transpontigas la murojn de malliberejoj, ĝi mildigas ia malsanecon kaj korpajn difektaĵojn. Kiu volus escepti homojn, kiuj vivas en plej malbona malliberejo. Estas bona agado, kiu nun maturiĝas. Dankon meritas „Radiowelt“, la sendstacio Radio-Hekafon, Silving kvarteto kaj la elpensinto de ĉi tiu ideo. Ili ĝoju je la ĝojo, kiun ili kaŭzos. Estas komenco, kiel nia tuta radiomovado nur estas komenco, sed la malfeliĉuloj partoprenu je ĝia kresko, progreso kaj sukceso. „Radiowelt“ aranĝas nun tiujn koncertojn; ĉu restu nur ĉi tiu donaco? Ĉu ne ĉiu humaneca instituto posedu propran aparaton? Kiu ĝin donacu al ili? Ĉu la institutoj, kiuj mem batalas kontraŭ grandaj financaj malagrablaĵoj, ilin aĉetu? La viduloj, la multaj, multaj viduloj donacu kaj baldaŭ pleniĝos la mondo de blinduloj kaj malfeliĉuloj, per afablaj, amikaj voĉoj. Sendu donacojn al la redakcio de „Radiowelt“, Wien III, Rüdengasse 11, kiu ilin publike kvitancos. Tradukis *Raim. Čedi.*

* * *

Spritaĵo: Anglo kaj Germano diskutis pri teknika progreso. „Ni estas teknike pli progresintaj ol vi,“ diris la Germano. „Proksime ĉe Berlin oni fosadis puton, kaj ĉu vi scias, kion oni trovis en centmetra profundo? Izolitan kuprofadenon. Tio pruvas, ke ĉe ni jam minimume antaŭ mil jaroj devis esti uzata telegrafio.“ — „Tio estas bagatelaĵo,“ respondis la Anglo trankvile. „Ni jam estas pli progresintaj ol vi. Ankaŭ ĉe ni, proksime ĉe London, oni fosadis puton, kaj ĉu vi scias, kion oni trovis en ducentmetra profundo? Nenion. Tio pruvas, ke ĉe ni jam antaŭ dumil jaroj certe estis uzata radiotelefonio.“

2

SUR LA TOMBO.

Guy de Maupassant.

Mi ŝin amis freneze.

Kial amas la homo?

Ĉu ĝi ne estas stranga: en la mondo vidi nur unu estaĵon, en la animo havi nur unu penson, en la koro senti nur unu sopiron, sur la lango havi nur unu nomon, kiu senĉese ŝprucadas el la profunda interno de l' animo kiel akvo el fonto, kiun oni elparolas, ripetadas kaj flustradas ĉiam kaj ĉie kiel preĝon!

Mi ne intencas rakonti nian historion; ĉiu amo ja komenciĝas same. Mi renkontis ŝin, enamiĝis je ŝi, kaj tio estas ĉio. Kaj unu jaron mi travivis kun ŝi, abundata de ŝia ĉarmo, ĉirkaŭprenata de ŝiaj brakoj, incitata de ŝiaj karesoj, ensorĉata de ŝia rigardo, ebriigata de ŝia vestaĵo, delogata de ŝiaj vortoj kaj tiel perfekte ĉirkaŭata kaj alligata de ĉio, kio apartenis al ŝi, ke mi ne konsciis, ĉu estas tago aŭ nokto, ĉu mortinta aŭ vivanta mi estas, ĉu mi troviĝas sur nia terglobo aŭ ie alie.

Kaj subite ŝi mortis. Kiamaniere? Mi ne scias kaj ne povas kompreni ĝin. Iun vesperon ŝi revenis hejmen tute malseka de pluvo, sekvintan tagon ŝi komencis tuseti, tusis, tusadis proksimume dum unu semajno kaj fine ŝi kuŝiĝis.

Kio okazis antaŭe? Mi ne scias ĝin!

Alvenadis kuracistoj, skribadis receptojn kaj ree foriradis. Oni alportadis kuracilojn kaj iu virino flegis ŝin. Ŝiaj manoj estis varmegaj, ŝia frunto brulanta kaj malseka, ŝiaj okuloj flamaj kaj malĝojaj. Ni interparolis. Kion? Mi ne

scias plu. Ĉion mi forgesis, tute ĉion. Ŝi mortis kaj klare mi rememoras pri ŝia malpeza ekspiro, kvieta kaj lasta.

La flegantino ekĝemis: „Ah!“

Mi komprenis. Kaj kio sekvis, mi ne povas rememori.

Mi vidis pastron, kiu demandis: „Ĉu via amatino?“

Al mi šajnis, ke li ofendas ŝin. Ĉar ŝi mortinta estas, havas neniu la rajton, pri io demandi. Mi lin rifuzis kun granda maldolĉeco. Venis alia pastro, kiu estis tre afabla kaj aminda, kaj mi ploris, kiam li ion demandis pri ŝi. Pri miloj da aferoj mi estis demandata koncerne la entombigo. Sed nenio restis en mia memoro. Male mi bone povas rememori pri la ĉerko kaj pri la frapoj de l' martelo, najlojn enbatanta. Ho Dio mia!

Ŝi estis entombigita; metita en nigran, profundan foson, kaj surŝutita per terajo. Al la tombo ŝin akompanis kelkaj el ŝiaj amikinoj. La tombejon mi forlasis kurante.

Longe mi vagadis tra la stratoj. Fine mi iris hejmen. Sekvintan tagon mi forvojaĝis.

* * *

Hodiaŭ mi revenis Parizon. Kiam mi ree ekvidis nian ĉambreton, nian kuŝejon, niajn meblojn, ĉion, kio restis ankoraŭ ĉi tie, kio restas el la vivo de estajo post ĝia morto, mi estis tiel kaptita de malĝojego kaj malespero, ke mi preskaŭ volis malfermi la fenestron, por salti tra ĝi sur la stratpavimon.

Nepovante toleri la restadon inter tiuj ĉi objektoj, inter tiuj ĉi muroj, kiuj ŝin ĉirkaŭadis, kies plej etaj fendoj certe enhavas milojn da atomoj de ŝia korpo, de ŝia spiro, mi prenis mian ĉapelon, por forkuri.

Sed en la sama momento, kiam mi celis al la pordo, mi pretiriris grandan spegulon, en antaŭĉambro troviĝantan, kiun ŝi mem tien alfiksis, por ĉiutage antaŭ la foriro observi sin de kapo ĝis kalkano, kaj juĝi, ĉu ŝia eksterajo, de la ĉapelo ĝis la ŝuetoj estas senriproĉa.

Kaj mi ekhaltis antaŭ tiu ĉi spegulo, kiu tiel ofte rebriligis ŝian staturon, tiel ofte, ke nepre devis resti iom da ŝia bildo en ĝi.

Tremante mi fikse rigardis la glatan, profundan kaj malplenan spegulon, kiu iam enhavis ŝin tutan. Kaj mi ekimagis, ke mi tiun spegulon amas. Mi tušis ĝin, ĝi estis malvarma.

Ho rememoroj, mizeraj rememoroj! Ho vi spegulo, kruela, brilema, vivanta, terura spegulo, kiel vi turmentas min! Kiel feliĉaj estas la homoj, kies koroj al spegulo similas, en kiuj bildoj ekaperas kaj tuj malaperas, kiuj perdas tuj ĉion, kio pasis, kio foriris, varmiginte sin per ilia sento, per ilia amo! Ho kiel mi suferas, nedireble suferas!

Mi eliris senkonscie, senkonscie kaj senvole mi iris al la tombejo.

Mi trovis ŝian tombon kun simpla marmora monumenteto, sur kiu estis engravuritaj ĵenaj vortoj:

Ŝi amis,
estis amata
kaj
mortis.

Kaj sub tiu ĉi ŝtono, profunde en la tero ripozas ŝi, putranta kaj polviganta. Kia terura penso!

Premante mian frunton al la herbo mi ĝeme eksingultis.

Mi restis tie dum longa, longa tempo. Mi rimarkis, ke jam vesperiĝis. Kaj stranga, freneza ia volupto ekkaptis min. Mi volis pasigi la lastan nokton kun ŝi kaj plori sur ŝia tombo. Sed oni povus rimarki min kaj perforte min elpeli el la tombejo. Kion fari?

Mi rifuĝis al ruzo.

Mi leviĝis kaj celis tra tiu ĉi kolonio numumo de mortintoj. Sencele mi promenadis tien kaj tien ĉi.

Kiel malgranda estas tiu ĉi kolonio kompare al la urboj de l' vivuloj! Kaj tamen, kiom pli multnombraj estas la mortintoj ol homoj vivantaj! Ni bezonas altajn domojn, stratojn kaj tiom da loko por unu generacio, nun vivanta, vidanta la taglumon, trinkanta akvon el fontoj, vinon de vinberejoj kaj manĝanta panon de l' kampoj!

Kaj ĉiuj homaj generacioj mortintaj

ĝis nun bezonas preskaŭ nenion, unu solan kampon, nenion plu! La tero reprenis ilin en sian sinon kaj la forgeso forvišas la rememoron pri ili. Pacon al ĉiuj!

Ĉe la fino de l' nova tombejo, kie oni enterigas novajn kadavrojn, mi ekvidis tombejon malnovan, jam forlasitan, kie la mortintoj jam delonge forputris, kie eĉ la krucoj super iliaj kapoj putras kaj kie oni eble morgaŭ denove fosos tombojn.

Plena de sovaĝaj rozoj kaj nigraj cipresoj. Melankolia kaj belega ĝardeno, fruktodona pro homaj korpoj!

Mi estis sola, tute sola.

Mi eksidis sub ia arbo, kies pendantaj, densaj kaj malhelaj brančoj min kašis perfekte.

Kaj mi atendis, premante min al la arbotrunko, kiel maristo sin alpremas al lastaj restajoj de subakviĝanta šipo.

* * *

Nigra nokto etendiĝis ĉirkaŭ mi. Mi forlasis mian kašejon kaj kviete per modera obtuzigita pašo mi ekiris tra la kampo de l' morto.

Mi iradis, longe, longe, longe, šian tombon mi ne povis trovi. Per strečitaj brakoj, per okuloj larĝe malfermitaj mi serĉis kaj esploris, per manoj, piedoj, genuoj, brusto, eĉ per la kapo, pušante ĝin al la monumentoj, sed malgraŭ tio mi ne atingis mian celon. Mi ĉirkaŭpalpadis kiel blindulo serĉanta sian vojon, kaj laŭvice mi surpalpadis štonojn, krucojn, ferajn kradarojn, girlandojn artefaritajn kaj girlandojn el floroj jam velkintaj. La nomojn mi legadis per la fingroj, šovante ilin sur la tombmonumentaj surskriboj. Kia nigra, profunda nokto! Mi ne trovis šian tombon.

La luno ne brilis. Kia terura nokto! Terura timego kaptis min sur tiuj mallarĝaj vojetoj inter vicoj da tomboj. Tomboj, tomboj, tomboj! Ĉie nur tomboj! Dekstre, maldekstre, antaŭ mi, post mi, ĉirkaŭ mi, ĉie tomboj.

Sur unu el ili mi eksidis, ne povante iri pluen, ĉar miaj genuoj tremis kaj malfortiĝis.

Mi aŭdis mian korbaton. Sed subite mi ekaŭdis ion alian. Kion? Malklare percepteblan ian brueton. Ĉu ĝi regis en mia troincitita kapo? Ĉu ĝi venas el netrapentrebla nokto aŭ el mistera, de homaj kadavroj plenigita tero?

Timeme mi ĉirkaŭrigardis. Kiel longe mi sur tiu ĉi loko restis, mi ne scias plu. Mi estis lamigita de timego kaj preskaŭ sveninta de teruregо, kaj preparis min al kriado kaj morto.

Subite šajnis al mi, kvazaŭ la marmora platajo, sur kiu mi sidis, iomete ekmoviĝus. Jes, ĝi ekmoviĝis, kvazaŭ ĝin iu levus de sube. Terurigite mi eksaltegis kaj kion mi vidis? La marmora platajo, sur kiu mi estis sidinta, leviĝis kaj el la tombo eliris senvesta, senkarna skeletulo. Kaj mi vidis ĉion, kvankam malhelo regis ĉirkaŭ mi.

Sur la tombmonumento estis skribita:

Jen ripozas
Jacques Olivant,
mortinta en 51ª jaro de sia aĝo.
Li amis sian familion, estis nobla
honestulo kaj mortis je la volo dia.

La mortinto ankaŭ tralegis tiun ĉi surskribon. Poste li prenis akran štoneton, sur la vojo kušantan, kaj komencis de la epitafo zorgeme forigi literon post litero. Foriginte ĉiujn, li ankoraŭ momenton rigardegis per siaj malplenaj okulkavoj tiun ĉi malplenan lokon.

Kaj per sia propra fingra osto li komencis skribi ruĝe lumetantajn literojn kvazaŭ per fosforaj alumetoj:

Jen ripozas
Jacques Olivant,
mortinta en 51ª jaro de sia aĝo.
Per sia krueleco li kaŭzis trofruan morton de sia patro volante heredi, turmentis sian edzinon kaj infanojn, trompis siajn najbarojn, štelis, kie li povis, kaj
mortis kiel fiulo.

Finskribinte la mortinto senmove rigardis la novan surskribon

Kaj turniĝin'e, mi rimarkis, ke ĉiuj tomboj estis malfermitaj, ke ĉiuj mortintoj eltombiĝis, kaj ke ĉiu forigadis la

mensogan surskribon, kiun la parencoj engravurigis sur la monumento, kaj skribis puran veron.

Kaj mi rimarkis, ke ĉiuj ĉi bonaj patroj, fidelaj edzinoj, dankemaj filoj, ĉastaj filinoj, ĉiuj ĉi honestaj homoj, viroj kaj virinoj estis pereigintoj de siaj proksimuloj, malutilintoj de siaj parencoj, fiuloj, enviuloj, hipokrituloj, friponoj, malĉastuloj, ofendintoj, mensoguloj, kiuj ŝteladis, trompadis kaj faris ĉiujn malnoblajn, malindajn krimojn.

Kaj ĉe siaj eternaj tomboj ili skribadis kruelan, teruran, sed sanktan veron, pri kiu neniu en la mondo scias, aŭ ŝajnigas, kvazaŭ li nenion scius.

Kaj mi ekpensis, ke ankaŭ ŝi certe la veron sur sia monumento skribas.

Sentime mi rapidis tra la malfermitaj tomboj, inter la mortintoj kaj skeletuloj rekte al ŝia tombo, estante konvinkita, ke mi ŝin certe trovos.

Mi ŝin efektive rekonis laŭ la staturo, kvankam ŝia vizaĝo estis kovrita per vualo.

Kaj sur la tombmonumento, kie mi antaŭe legis: „Ŝi amis, estis amata kaj mortis“, mi ekvidis jenajn vortojn:

Elirinte iam el sia hejmo,
Por trompi sian fianĉon
Ŝi malvarmumis de pluvo
kaj
mortis.

Kiel mi povas rememori, oni trovis min je la matena krepusko sveninta sur iu tombo.

Esperantigis *V. Klitil.*

Pacifista manifestacio

lunde, 11. aŭgusto, 15·30 ĝis 17·30 horo.

Programo:

1. Enkonduko: J. S. Bach, preludo en Es por orgeno (s-ro Karl Mätzl).
2. Saluto kaj konciza raporto pri ĝisnunaj laboroj kaj pri proponoj preparitaj en la laborkunsido por decidado (s-ro R. M. Frey).
3. Definitiva elekto de la ligestraro.
4. Parolado de l' protektanto s-ro universitata dekano d-ro Fiz. Ed. Suess.

Paŭzo.

5. Deklamo: „Preĝo sub la verda standardo“ (s-ro Philipp v. Zeska, aktoro de Burgtheater).
6. Parolado de s-ino Julia Isbrücker.
7. Cefparolado de s-ro d-ro Edmond Privat.
8. Fino: Esperanto-himno orgenakompanata.

SE AL VI PLAĈIS

la enhavo de tiu ĉi numero,
abonu nian ĵurnalon!

Gekongresanoj! Nepre vizitu la fakajn kunsidojn!

Esperantaj organizoj en Wien.

Asocio por komerco kaj helplingvo tutmondaj. V, Margaretenstrasse 120.

Aŭstria Esperanto-Delegitaro. VI, Mollardgasse 55.

Aŭstria Landunuiĝo de Fervojistoj Esperantistaj. II, Nordbahnhof (Insp. Kühnel).

Aŭstria Katolika Ligo Esperantista. VIII, Piaristengasse 43.

Aŭstria Laborista Ligo. XVI, Hubergasse 1/16.

Bohema Klubo Esperantista. XV, Turnergasse 9.

Ekzekutivo de l' komunista Esperantistaro de Aŭstrio. XX, Handelskai 1 B.

Esperantista Societo Jan Amos Komensky en Wien. II, Blumauerg. 14.

Esperantista Unio fervojista. XIV, Aredikstrasse 2.

Esperanto-Delegitaro de Wien. VIII, Hamerlingplatz 5.

Esperanto-Junularo. III, Radetzkystr. 25.

Esperanto-Societo „Danubio". VII, Lerchenfelderstrasse 23.

Esperanto-Societo de Blinduloj. VII, Zieglergasse 25.

Esperanto-Societo „Progreso". IX, Währingerstrasse 43.

Esperanto-Tablo „Verda Stelo". VI, Gumpendorferstrasse 39.

Esperantoverein „Fideleco". XVIII, Gymnasiumstrasse 2.

„Frateco", Esperantista Laborista Societo. VII, Lerchenfelderstrasse 1.

„Frateco", Esperantista Laborista Societo. Loka grupo XXI, Angererstrasse Nr. 14.

Instruista unuiĝo „Esperanto". VIII, Hamerlingplatz 5.

Polica Esperanta Unuiĝo. VII, Karl Schweighofergasse 3.

Sennacieca Asocio Tutmonda. Grupo Wien VII, Lerchenfelderstrasse 1.

Tramvojista Unuiĝo Esperantista. XII, Steinhagegasse 3.

Grupo „Wienzeile", XIII, Penzingerstrasse 72.

Grupo „Meidling", V, Bräuhausg. 17.

Grupo „Hernals", Strassenbahnremise Hernals.

Ukraina Studentunuiĝo „Sitsch". XVIII, Theresiengasse 15.

Universala Esperantista Pacifista Ligo. Centro Budapest, Sekcio Wien III, Bechardgasse 14.

Universala Esperanto-Asocio. Centro Genève, Ĉefdelegito Wien Dr. E. Sós, I, Tuchlauben 18.

Universala Esperanto-Asocio Junulara. Centro en Baugé (Francujo), Sekcio Wien VI, Mollardgasse 55/7.

Unua Esperanto-Unuiĝo en Wien. I, Himmelpfortgasse 6.

*

Nova Tempo-Eldonejo, Wien VI, Mollardgasse 55.

(Listo de la aliaj Aŭstriaj asocioj estos publikata en la venonta numero.)

Atentu! Asocioj kaj komercistoj!

Verkojn kaj ĉiujn aliajn fakajn laborojn por metiaj kaj industriaj celoj en korekta kaj aktuala efektivigo je malaltaj prezoj akceptas

Gstaltner & Co. G.m.b.H., **Korneuburg** (Austrio), Presejo de „Austria Esperantisto"

ANONCOJ 3liniaj anoncetoj kostas 4000 aŭ. K. — Reklamo 1/8 paĝo = 30 mil, 1/4 paĝo = 50 mil aŭ. K por unu numero, por pluaj laŭ interkonsento

pk. = poŝtkarto, il. = ilustrita, hm. = helpmono, l. = letero, pm. = poŝtmarkoj.

F-ino **Irma Ultmann,** Boskovice (Č.S.R.), serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj.

Anton Bubeniczek, Korneuburg apud Wien, Laaerstrasse 61, deziras korespondi kun eksterlandanoj.

F-ino **Poldi Oberndorfer,** Ober-Wagram 73 apud St. Pölten (Aŭstrio), deziras koresp. kun eksterlandanoj pro perfektigo en Esp.

S-ino **Olga Sariceva,** Astraĥan (Rusujo), Kanara 111, koresp. pri infanedukado kaj aliaj seriozaj temoj, il. pk.

Redaktoro de „Aŭstr. Esp." **Hugo Steiner,** Korneuburg apud Wien, Hovengasse 12, interŝanĝas pm. kaj hm. Ne sendas unue, sed ĉiam tuj respondas.

K. Langegger, St. Pölten (Aŭstrio), Fuhrmanngasse 14, deziras ŝanĝi il. pk. kun ĉiulandaj samideanoj.

Dr. Josef Fikéis, komonumoficisto, Korneuburg (Aŭstrio), Albrechtstrasse 31, koresp. pri geografio kun ĉiulandaj gesamideanoj.

Tuovinen, Mikkeli (Finlando), serioze koresp. kun astrologioj, okultistoj, framasonoj.

Jaromir Řebiček, Olomouc 2, Hlavni nádraží 103, I. (Č.S.R.), interŝanĝas pm., il. pk., l., esperantajn gazetojn.

Joh. Wiedermann, Korneuburg apud Wien, Kirchengasse 3, deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj. Ne sendas unue.

M. Zöchling, St. Pölten (Aŭstrio), Schiesstattring 27, deziras ŝanĝi il. pk. kun eksterlandanoj.

Livingstone Jenkins, 64 St. Thomas, Rd. London N., interŝanĝas pm., esp. gazetojn. Certe respondas.

Ferd. Neidhart, Korneuburg apud Wien, Kirchengasse 4, korespondas pri politiko de nacia ekonomio, ŝanĝas ankaŭ pm.

Hans Kossik, Wien II, Vorgartenstrasse 181, interŝanĝas pm. escepte kun Polujo, Ĉehoslovakio kaj Germanlando.

20jara fraŭlo deziras por perfektigi sin en Esp. koresp. kun fraŭlinoj. Franz Mille, St. Pölten (Aŭstrio), Schiesstattring 8.

Matth. Altrichter, kand. jur., tre volonte korespondas kun kolegoj tutmondaj. Korneuburg apud Wien, Hovengasse 12.

Frz. Floth, Wien XX, Treustrasse 31, interŝanĝas pm. kaj il. pk. kun eksterlandanoj.

F-ino **Herta Ullrich,** Korneuburg apud Wien, Hovengasse 10, muzikstudantino, korespondas pri muziko.

Walter Pfeiffer, St. Pölten (Aŭstrio), Lederergasse 10, tre volonte korespondus kaj ŝanĝus artajn pk. kun liberpensaj fraŭlinoj.

Bankoficisto, 25jara, korespondas kun ĉiu lando. **Julio Peteri,** Budapest VII, István-ut 6 (Hungario).

F-ino **M. Schwarzböck,** Korneuburg apud Wien, Kreuzensteinerstrasse 14, deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj.

Hans Lachmann, St. Pölten (Aŭstrio), Klostergasse 9, deziras korespondadi kun liberpensaj fraŭlinoj.

Oficisto de granda ferfandejo (vendsekcio) serĉas aĉetantojn (eventuale ankaŭ oficŝanĝon). Respondu sub „aŭstra fermuldejo" al Esperanta kongreso.

F-ino **Anna Riedl,** Korneuburg apud Wien, Hovengasse 12, deziras ŝanĝi il. pk., poŝtmarko bildflanke

Du izolaj amikoj partoprenos la XVI-an sabate vespere kaj dimanĉe, kaj serĉas kuniĝon por tiuj ĉi tagoj kun du junaj, spritaj, lioerpensaj fraŭlinoj. Respondu je „disiĝa kalkulo" al Esperanta kongreso.

Ernst Specht, komonumoficisto, Korneuburg apud Wien, Albrechtstrasse 29, interŝanĝas pm. kaj il. pk.

Fritz Naumann, Korneuburg apud Wien, Lebzeltergasse 4, korespondas per il. pk.

F-ino **Minna Müllner,** instruistino, Korneuburg (Aŭstrio), Chimanigasse, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

KUDROMAŜINOJ
BICIKLOJ KAJ
SKRIBMAŜINOJ
PICK • WIEN
Centra magaz.: IX, Liechtensteinstr. 27
Filioj: IV, Wiedner Hauptstrasse 10 kaj
VI, Gumpendorferstrasse 67.
Oni parolas Esperante!

Informoj ĉiuflankaj estos tre volonte akceptataj!

Eau de Cologne *Bouquet de Messine*

Z 1111

PARFUMFABRIKO MARBA, WIEN XII

SCHÖNBRUNNERSCHLOSSTRASSE 20

POŜTMARKOJNKOLEKTANTOJ

VIZITU LA POŜTMARKVENDEJON

R. JARMUTH

WIEN II, FRANZENSBRÜCKENSTR. 14

PREZLISTON SENPAGE!

AĈETO! ŜANĜO! VENDO!

En la eldonejo

Paul Knepler

(Wallishaussersche Buchhandlung)

Wien I, Lichtensteg Nr. 1

aperis:

ŜOLANDRO de Waldemar Bonsels. Belega novelo. 15 000 aŭ. K (1.50 sv. fr.).

LA PAN-EŬROPA MANIFESTO de d-ro R. N. Coudenhove-Kalergi. Grava kulturpolitika broŝuro. 6000 aŭ. K (0.50 sv. fr.). Ambaŭ tradukis d-ro E. Sós.

VOLLSTÄNDIGER LEHRGANG DES ESPERANTO de Glück & Sós. Bonega lernolibro por germanoj. 12.000 aŭ. K.

POEZIAĴOJ de Frideriko Schiller. Tradukitaj de F. Zwach. Reaperos post la kongreso. 15.000 aŭ. K (1.50 sv. fr.).

Filatelistoj! Ĉu vi volas belajn pm. por tre malaltaj prezoj? Se jes, tiam postulu de mi belajn elektaĵojn kaj prezaron! **Josef Kolnhofer,** Wien XIII/5, Postamt 91, fako 6.

Kehrotin-entrepreno J. Weiniger (tel. 33383) Vaksigo de fabrikplankoj sen interrompo de l' fabrikado. Vendejo de l' kontraŭpolva oleo kaj polvoligantaj balaorimedoj k. t. p.

Eldona Kooperativo

de E. U. P.

rekomendas lernilojn de Esperanto por germanoj kaj ĉeĥoj, jarkolektojn de „La Esperantisto“ kaj ĉiujn aliloke eldonitajn instruilojn.

Mendeble ĉe **R. ČECH, Wien IX/1,** D' Orsaygasse 7/23.

DREIRING **tualet- lav- } sapoj je kvalito nesupereblaj.**

Niaj krudsapoj raboterformaj (sekaj) estas multe ŝatataj eksterlande por fabrikado de tualetsapoj.

Strohbach & Co., Wien VIII, Strozzigasse Nr. 32

Oni korespondas Esperante!

Eldonanto: Esperanto Unuiĝo en Korneuburg (Redaktoro: Hugo Steiner, Korneuburg, Hovengasse 12). — Presejo: Gstaltner & Co., G. m. b. H., Korneuburg, Kirchengasse 3.

Al: „Jun-Austrianoj en Traiskirchen."

Ĉefkonstruajo. Sudflanko.

Ĉambro en la hejmo kun murpentrajo skizita kaj efektivigita de 14jaraj knaboj.

14 jaruloj pentrantaj lavejon.



Lerneja laborejo por lignajfarado.

Paŝada danco.



Supre: Modlajoj de maturaj lernantoj.
En la mezo kaj malsupre: Modlajoj kaj gipstranĉajoj de 11 jaruloj.

Senaparataj gimnastikekzercoj en la printempa festo 1921.

Rulebenigo de la ludejo.

Al: „Centjara evoluo de la Aŭstriaj fervojoj."

Franz Xaver Riepl, profesoro en la i. r. politeknika instituto Wien, planis kaj kalkulis la projekton de fervojo inter sal- (Bochnia, Polujo) kaj karbminejoj (M.-Ostraŭ, Ĉeĥoslovakio) kaj Donaŭ (ĉirkaŭ 420 km).



l. r. aŭstria rapidpoŝtveturilo el la tempo antaŭ la fervojoj.



La unua stacia halo en Floridsdorf, nun XXIa distrikto de Urbo Wien.



La unua ponto trans Donaŭ (1838).



Veturprovo sur Nordbahn (t. e. Nordfervojo) 19. novembro 1837.

Plej nova tipo de elektra lokomotivo por rapidtrajnoj trans Arlberg. Serio 1100, 2200 PS po horo je 65 km/h.

La klišojn afable disponigis la fervojministerio, Urbo Wien kaj Brown-Boveri-Werke A.G.